nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2015

## ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

La dimanĉon 14an de decembro, antaŭtage de la Internacia Tago de Esperanto, la madridaj esperantistoj kaj simpatiantoj kunvenis por pasigi belan tagon honore al la kreinto de nia lingvo. Por tio, kiel pasintjare ili denove renkontiĝis en la sidejo de la "Asociación de Vecinos de Zofío", distrikto Usera de Madrido.

La matenon oni dediĉis al prelegoj. Unue, José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF, bonvenigis la ĉeestantojn kaj instigis legi la verkojn de Zamenhof, plu aktualaj hodiaŭ, por lernantoj kaj por spertuloj. Li specife memorigis la "Alvokon al Diplomatoj", kiun Zamenhof verkis ĝuste antaŭ cent jaroj, kiam pli furiozis la Unua Mondmilito, kiun ĵus represis la gazeto "La Ondo de Esperanto", kaj kies ĉefaj tezoj montriĝis des pli klarvidaj.

Poste, Miguel Fernández prezentis kelkajn novajn librojn kaj projektojn. Unue, la konatan antologion de revoluciema literaturo, "Poezio, armilo ŝargita per futuro", kiun SAT-en-Hispanio reeldonis pro elĉerpiĝo de la antaŭa eldono. Sekve, li prezentis la antologion de rakontoj originale verkitaj en Esperanto kaj tradukitaj en la svedan (vidu informon en pasinta numero de Nia Voĉo). Poste, li rakontis pri la tri projektoj pri kiuj li nun intense laboras. Unue, pri la traduko, preskaŭ preta, de "Bohemiaj Lumoj", de Ramón Mª del Valle-Inclán. Due, pri tradukoj por libro pri anarkiismo, inklude de ties rilato kun Esperanto. Trie, pri la esperanta versio de la memoraĵoj de nia esperanta pioniro Jaume Grau Casas, pri liaj travivaĵoj en la koncentrejoj de Francio post la hispana interna milito.

Parto de la prelego de Miguel estis filmita kaj enretigita en la jutuba kanalo de MEL, en la adreso https://www.youtube.com/watch?v=YnoMoTkYJmo.

Tuj poste, la prezidanto de la kvartala asocio ĉe kiu ni gastis, rakontis al ni, hispane, pri la agadoj de la asocioj, kaj pri la malbonaj cirkonstancoj kiujn ili trapasas, sekve al ĉikanoj ricevitaj fare de la urbestraraj aŭtoritatoj.

Fine, Félix Jiménez Lobo prelegis pri la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, kiujn li partoprenas, kaj instigis partoprenontojn por postaj kursoj. Temas pri tre grava sperto persona, tre altnivelaj studoj, kaj tre grava evento por la esperanta komunumo, kiun oni sukcesas pluvivigi ankaŭ per la helpo de bonvolemuloj kaj asocioj.



Poste oni organizis komunan manĝadon, per la pladoj alportitaj de la partoprenantoj mem. Ĉijare speciala evento estis la gustumado de novaj ne-industriaj bieroj produktitaj de la kooperativo "Speranto", nomataj "Zamenhof" kaj "Blanka Tigro", kun ĝenerala kontentigo.

Dum la postmanĝado oni organizis tabloludojn, kaj atelieron pri fabrikado de sapo. Estis muntita ampleksa Libroservo, kiun prizorgis SATeH.

Fine, estis aranĝita projekciado de "La plejpleja festivalo", dokumenta filmo pri la Kultura Esperanto Festivalo en Helsinko en 2005.

Entute la feston partoprenis ĉirkaŭ trideko da homoj, en diversaj periodoj de la tago.

## MADRIDA SAMIDEANO, NOVA PREZIDANTO DE HEJS

En pasinta monato decembro estis elektita Alejandro Escobedo kiel nova prezidanto de Hispana Esperantista Junulara Societo, HEJS, la junulara sekcio de HEF. Alex naskiĝis en 1992, loĝas en Madrido kaj diplomitiĝis pri Tradukado. Li lernis Esperanton en oktobro de 2010, kaj trapasis la ekzamenojn de la lingvo en la nivelo C1 dum pasinta Kongreso.

## VIZITOS NIN

Anonciĝis en la lastaj semajnoj la venoj de novaj vizitantoj al Madrido, kelkaj el kiuj serĉis helpon aŭ informado pri gastigado.

Paulo Banaco, portugala esperantisto loĝanta en Coímbra, anoncis en Fejsbuko ke li planas vojaĝon al Madrid je la venonta februaro kaj demandas pri ne multekosta hotelo aŭ gastejo en nia urbo. Li estas kontaktebla per Fejsbuko aŭ ĉe la adreso *banaco.trb (ĉe) gmail.com*

Nia korea amiko Heroo, nun studanta en Madrido, anoncis la alvenon de alia korea amiko, meze de februaro. Memoru ankaŭ la anoncon, kiun ni konigis en pasinta numero, de la veno de almeria amiko, Indalecio Seura, kiu informis ke ekde la 7a de januaro li venos labori al Madrido dum du monatoj, kiel profesia dancisto.

Pri rendevuoj kun niaj amikoj ni informos per la kutimaj komunikiloj.

## DU ANONCOJ POR LA MEMBROJ DE MEL

La ĝenerala kunsido de MEL okazos la lundon 26an. Post kelkaj tagoj ĉiuj membroj ricevos la formalan alvokon kun la tagordo, kaj ceteraj dokumentoj. Ni interalie pritraktos eblan eldonon de la verko "Bohemiaj lumoj" de Valle-Inclán.

Estas la momento por ke la membroj de MEL rekotizu por la nova jaro 2015. La jara kotizo plu restas je 12 €, pagebla en la konton de Esperanto-Liceo de Madrid ĉe la banko Sabadell: 0081-7110-98-000 126 6730; aŭ rekte al iu membro de la estraro. Ne forgesu indiki vian nomon ĉe "concepto", ĉar male ni ricevus sennoman enspezon.

Kaj se vi ankoraŭ ne estas membro de Liceo, vi kompreneble povas nun fariĝi. Venu al la Ĝenerala Kunsido, aŭ simple plenigu kaj sendu la aliĝan formularon ĉe http://www.esperanto.es/pli/images/MEL/MELinscripcion.doc.

## HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Jam pretas en la reto la informoj pri la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la turisma urbo Cullera (Valencio) inter la 1-a kaj 3-a de majo 2015. Vizitu la retejon http://esperantoval.org/cullera2015/, kie troviĝas ankaŭ la aliĝilo al tiu renkontiĝo.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30 post la feria periodo.

En januaro, la unuasabataj renkontoj ĉifoje ne okazos la unuan sabaton, sed la duan, pro la ferioj. Do, la 10-an vespere. Atentu la informojn kaj konkretigojn per la sociaj komunikiloj

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, kaj la Fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.